*Eldonnombro 13 000*

# LA KOMERCO

**Oficiala Bulteno de Komercista Esperanto-Unio**

Centra Oficejo: Dresden/Radebeul, Friedrich-Auguststr. 4

Agentejoj en: Danzig, Funchal, Hvammstanga, Lawang, Lodz, Maur, Plauen, Recht, Valencia

La bulteno estas sendata al niaj agentoj kaj klientoj senpage, neklientoj kaj nekomercistoj povas aboni por RM 0.25 po numero. La bulteno aperas laŭbezone.

Numero 21 + Eldonita en decembro 1934

# Nova servo — Grava KEU-progreso — 3000 Gmk. al UEA. Valoraj premioj.

## Al niaj legantoj.

Nian hodiaŭan komunikon ni skribas sub la impresiga fakto de kelkcentprocenta pligrandiĝo de la debito dum Aŭgusto/Oktobro kompare al la sama tempo en 1933. Kelkaj el niaj „kunlaborantoj" kaj agentoj modele laboris kaj sendis konsiderindajn mendojn, pri kiuj eĉ Dresdenaj gazetoj raportis. Ni elkore dankas pro la granda subteno, kiun per tio ricevis nia penado, enkonduki Esperanton en Komerco kaj Industrio.

Tiu videbla signo de kunhelpo instigis nin al nova paŝo, al servo grava por niaj legantoj kaj ni esperas, esti utilaj per ĝi al ĉiuj. Ni starigas

**rapid-informservon pri novajoj**

funkciantan laŭ jena maniero:

Ni enregistros en aranĝota kartoteko laŭ branĉoj ĉiun, kiu sendos al ni karton kun jenaj indikoj:

Urbo: lando: profesio:
Nomo:
Adreso:
Specialaj deziroj:

Ni informos per specialaj cirkuleroj tuj, kiam ni aŭdos pri eltrovo grava, novajo, plibonigo, praktika uzadartiklo ktp. sendonte cirkulerojn al tiuj registritoj, kies branĉon koncernas la novajo.

Ekzemple (vidu la priskribon en la rubriko „Novaĵoj") ni estus informontaj ĉiun registriton en la fako „Aŭtomobilvendisto" pri la novajo „La okulo en la motoro".

Progresema komercisto certe ŝatos tian informon, ĉar li taksos alte, povi liveri al siaj klientoj ĉiam tion plej novan. Propagandema Esperantisto uzos la okazon, por informi konatan al li komerciston, dirante al li samtempe kelkajn vortojn pri la valoro de Esperanto. **La Komercistaro kaj ĝenerale la tuta mondo nur akceptos Esperanton, se ili vidos praktikan valoron. Tial: Uzu ĉiu nian servon!**

Karaj gesamideanoj, vi vidas, ke ni faros ĉion por servi al vi. Ni opinias, ke ni rajtas nun ankaŭ **postuli** de vi kontraŭservon. Ni celas sole, ni refoje tion diras, la kunlaboron, la disdonon de niaj ofertoj, la kolekton de mendoj, la skribon de demandkartoj al la anoncintaj firmoj, la tradukon kaj aperigon de la specialartikoloj kaj la alsendon de la represo.

Al niaj 13 000 „kunlaborantoj"! Ĉar laŭ nia observo nur tre malmultaj plenumis nian „unuan taskon", donitan en N-ro 20, ni ne jam publikigas la duan, sed petas, agi tuj — la vintra sezono estas tre taŭga — laŭ nia instigo en N-ro 20, uzante la hodiaŭajn ofertojn.

**Financa helpo al UEA en valoro de Gmk. 3000.— per KEU.**

Ĉu realigebla? Jes! Se ĉiu leganto mendas por si aŭ per amiko la novan „pinglopintan razaparaton", pri kiu ĉiu aĉetinto estas entuziasmigata, ni atingos prezredukton, el kiu ni povos pagi al UEA Gmk. 3000.—. Ni rezervos de ĉiu mendo je la nomitaj razaparatoj (prezo po Gmk. 1.— afrankite), alvenonta ĉe ni ĝis 1. 4. 1935, 20% por UEA. Komencu tuj vastan propagandon por tiu komuna celo!

**Pliriĉigo de la enhavo de niaj bultenoj.**

Ni intencas publikigi de nun originalajn artikolojn pri diversaj problemoj de la internacia komerco. Ni kore dankas al s-ro d-ro Vogt, Stuttgart, kiu afable liveris la unuan artikolon, kaj al s-ro d-ro phil. Winkler, Dresden, fama reklamspecialisto, kiu permesis al ni represon de artikolo, en kiu li donas sian specialan atentindan opinion pri „La ideo de la rekamo".

## Ĉu la mondo estas tro malgranda aŭ la homoj tro malprudentaj?

(Originala artikolo de s-ro d-ro Vogt, bankiero, Stuttgart.)

„La mondo plimalgrandiĝis" — ĉiutage oni povas legi tion en la gazetoj. Distancoj, kiuj iam postulis monatojn, povas nun esti transpasataj en unu semajno. Propono de komercisto, kies respondon oni devis iam atendi dum kelkaj semajnoj aŭ monatoj, povas esti pritraktata hodiaŭ dum kelkaj horoj per rekta diskutado. Ne daŭros plu longan tempon, ĝis kiam la plej rapidaj ŝipoj estos rigardataj kiel „malviglaj varkestegoj", kaj oni nomos la hodiaŭajn rapidvagonarojn „limaktrajnoj". Kelkio ŝanĝiĝis sur nia ĝiba mondo. Sed ne nur la rapideco de vojaĝo kaj trafiko! Ankaŭ io alia aliiĝis. Antaŭ 40 jaroj kelkaj Eŭropaj ŝtatoj estis „la" industri-ŝtatoj, — per la fingroj de unu mano oni povis ilin denombri. Hodiaŭ ĉiu, eĉ la plej malgranda ŝtato en Eŭropo kreis sian industrion. Nun Ameriko jam de longa tempo preterkuris Eŭropon. Hodiaŭ Ĉinujo kaj Hindujo fariĝas industriaj teritorioj, kaj Japanajn varojn oni povas aĉeti en ĉiu Eŭropa ŝtato. Ni travivis en Eŭropo kelkajn revoluciojn, kaŭzitajn de la milito kaj la postmilita tempo. En Eŭropo la ŝtatoj estas okupataj per zorgoj pri likvidigo de la militsekvoj. La plimulto de la Eŭropaj ŝtatdirektantoj opinias, ke ili devas uzi sian tutan energion por daŭrigo de la „status quo" de l' jaro 1919. Ili tute ne rimarkis, ke intertempe fundamente ŝanĝiĝis la ekonomia situacio de Eŭropo kaj de la tuta mondo, evoluo ne jam finita. Se oni lasos la aferojn daŭrigi kiel ĝis nun, la ĥaoso ne estos evitebla. Nur prudento, politika klarvido kaj saĝa agado povos reforigi la malordon kaj krei tolereblajn cirkonstancojn por ĉiuj koncernatoj. Ĉu tio estas ebla? Jes, tio estas ebla, se, kiel dirite, racio kaj bona volo gvidos. Tamen necesaj estos aliaj premisoj.